Joseph Freiherr von Eichendorff,

# La gaja migranto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

.....
.....
.....
.....

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi;
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo.
Li zorgas pri la tuta ter':
Li ankaŭ min, sur mia vojo,
Eterne gardos de danĝer'.

*Traduko de la Germana poemo "Der frohe Wandersmann" de* JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-234-462 (2008-04-01 19:09:17)*